



## PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Homo kaj Kosmo  
populara natur-  
scienca revuo

Jara abonkotizo  
6,- GM

Aperis n-ro 1/75  
=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113 1  
D-85 Nürnberg  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 17/1975 7 majo 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Kunsido de la UEA - estraro

Rotterdam (pp). La Estraro de Universala Esperanto-Asocio havis sian printempan kunsidon en Rotterdam je la 11a, 12a kaj 13a de aprilo 1975, kiun ĉeestis ĉiuj estraranoj, la direktoro kaj la vicdirektoro de la Centra Oficejo.

El la cirkulero de la ĝenerala sekretario de UEA, E.L. M. Wensing, pri la decidoj de la estrara kunsido ni publikigas jenajn citaĵojn:

### Universala Kongreso en Kopenhago

La Estraro grandparte definitivigis la kongresaranĝojn. Al la provizora programo, ellaborita de la direktoro de la C.O. kunlabore kun la Kopenhaga LKK., estis aldonitaj du ekstraj estrarkunsidoj. Okazos sep kunsidoj de la diversaj komisionoj. La komisiono pri landa agado okazigos kunsidon kun funkciuloj de la Landaj Asocioj je ankoraŭ fiksota dato. En speciala seminario pri la Financa Kampanjo, la prezidanto de UEA raportos pri tiu temo. Eniris la programon kunvenon pri CED, kiun gvidos d-ro J. Pool. CED ankaŭ aŭspicias kunsidon de interlingvistikistoj. Nova estos ankaŭ publika kunveno pri la Esperanto-gazetaro, kiun gvidos la redaktoroj de la revuo "Esperanto" kaj de la gazeto "Heroldo de Esperanto".

La Estraro fiksas la kongressemajnojn por la jaroj 1976 (Ateno) kaj 1977 (Reykjavik). Ili estas respektive: 31 julio - 7 aŭgusto, kaj 30 julio - 6 aŭgusto.

### Financa situacio de UEA

La estraro de UEA, tuj post la Hamburga UK., estis devigita fari plurajn, sufiĉe rigorajn, decidojn por laeble redukti la kostojn kaj pliigi la enspezojn de la Asocio. Estas evidente, ke tiuj decidoj ne plu povis grave influi la rezultojn por la jaro 1974, kvani sukcesis limigi la deficiton je ĉirkaŭ 39.000 guldenoj kaj la reduktiĝon de la Asocia Kapitalo je 3.000 guldenoj. Pli klare tamen montriĝis la efikeco de la faritaj decidoj en la buĝeto por la nuna jaro, ĉar, se la membronombro (kaj kun ĝi la kotizoj) ne grave falos - pri kio en tiu ĉi momento la C.O. ankoraŭ ne havas sufiĉe klaran bildon - ekzistas granda ebleco ke la jaro 1975 saldiĝos sen deficino. La konto "salajroj" malpliigis per ĉirkaŭ 25.000 guldenoj, la decido pri eldono de nur unu Jarlibro kaj limigita distribuo de la Estrara Raporto ŝparigas al la Asocio proksimume 12.000 guldenojn, dum aliflanke la enspezoj el kotizoj, altigitaj por la jaro 1975, estos verŝajne pli altaj ĉi-jare, kompare kun la pasinta jaro. Ankaŭ la enspezoj el la Libroservo estos je proksimume 8.000 guldenoj pli altaj ol estis la finaj ciferoj por la jaro 1974.

Tre ĝojiga estas la - multe pli granda ol atendita - alfluo de mal-avaraĵ donacoj kaj la daŭre kreskanta aliĝado de membroj al la nova kreita "Societo Zamenhof".

La prezidanto de UEA ellaboris detalan manlibron por financa kampanjo, kies celo estas unuavice spili fontojn ekster la Movado por tiel plifortigi la kapitalan bazon de UEA kaj de ĝiaj kunlaborantaj landaj kaj fakaj asocioj.

Pro la necerteco de la monda ekonomia situacio kaj ankaŭ pro ankoraŭ ekzistantaj prokrastoj en la administracio en la C.O., ankoraŭ ne estis eble fari iom fidindan buĝetproponon por la venonta jaro, sed espereble la Estraro povos tian prezenti en Kopenhago.

#### Ceteraj decidoj

La Estraro akceptis definitive la inviton de Reykjavík (Islando) por UK en 1977 kaj aprobis la proponitan konsiston de la LKK. La mandatoj de la nunaj estraranoj de Institucio Hodler '68 estos rekonfirmitaj por nova deĵorperiodo.

La Statuta Komisiono diligente laboris dum la pasintaj monatoj kaj prezentis plurfoje reviziitan projekton de nova statuto al la Estraro. Estis decidite okazigi en Kopenhago publikan kunvenon pri tiu temo. La Estraro rekomendis al la Komitato komenci proceduron cele al daŭrigo de la valideco de la nuna statuto pro tio ke, laŭ nederlanda juro, estas tre malfacile kaj temporabe aprobigi novan statuton en relative mallonga tempo. Pri tiu punkto la Estraro skribe voĉdonigos la Komitaton jam antaŭ Kopenhago. Post akiro de aprobo de plilongigo, devos okazi la ĝenerala voĉdono pri ĉiu unuopa paragrafo de la nova statuto.

#### Kelkaj finaj rimarkoj

Malgraŭ tio, ke la Estraro kunsidis dum tri longegaj tagoj, ĝi ne sukcesis fintrakti la tutan, tre ampleksan, tagordon de 78 eroj. Financoj kaj administrado, pritrakto de la nova statuto, detaligo de la Kopenhaga kongresprogramo kaj pluraj aliaj temoj postulis profundan interkonsiliĝon, sekve multan tempon.

Krome estis dekoj da aliaj temoj, al kiuj la Estraro devis dediĉi sian plenan atenton. Mi menciuj nur kelkajn: unueigo de la Movado, fortikigo de niaj kunlaborantaj Landaj Asocioj kaj Fakaj Organizaĵoj, kampanjo por la NOBEL-pacpremio, Eŭropa agado, agado en internaciaj sindikataj rondoj, proponotaj novaj Honoraj Membroj de la Asocio, agado inter parlamentanoj, kolektivaj abonoj je la revuo "Esperanto", Belartaj Konkursoj, Turismo, la junulara sekcio de UEA (TEJO), la Internacia Gazetara Servo, ĝenerala enhavo de la Estrara Raporto pri la jaro 1974-1975, ktp., ktp.

La Estraro decidis okazigi sian proksiman kunsidon tuj antaŭ la komenciĝo de la UK en Kopenhago, je vendredo, la 25a de julio 1975.

\*\*\*\*\*

#### Organiza Komitato pri la Internacia Jaro de la Virino

Rotterdam/Lansdowne, Pa./USA/(pp) La 21an de aprilo 1975 la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, anoncis la konsiston de la Organiza Komitato de UEA pri la Internacia Jaro de la Virino. La tasko de la Organiza Komitato estos plani kaj direkti la kontribuon de la Asocio al la Virina Jaro. Estro de la Komitato estos s-ino Elsbeth Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FRG). La aliaj anoĵ de la Komitato estos s-ino Ursula Grattapaglia el Brazilo (Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso, Goiás), s-ino Yukiko Isobe el Japanujo (14-1 Minami Nagasaki 2-chome, Toshimaku, Tokio 171), s-ino Elizabeta Pallós el Hungarujo (Petöfi u. 43, Pécs) kaj s-ro Ib Schleicher el Danlando (Ved Bellahøj 21.13, DK-2700 København BRH).

S-ino Bormann estas kvalifikita infanvartisto, kaj estis unu el la organizantoj de la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo en 1974. S-ino Isobe estas direktorino de komerca firmao kaj de la

Japana Esperanto-Instituto. Laŭ profesie s-ino Pallós estas eko-  
nomiisto, kaj s-ro Schleicher estas inĝeniero. S-ino Grattapaglia  
elmigris el Italujo antaŭ unu jaro kun siaj edzo kaj infanoj, kaj  
nun laboras kiel instruisto en Esperanto-komunumo en la interno de  
Brazilo.

La jaro 1975 estis deklarita Internacia Jaro de la Virino fare de  
la Ĝenerala Asembleo de la Unuigintaj Nacioj antaŭ du jaroj. La  
ĉefa celo de la Jaro estas emfazi la esencan rolon de la virino en  
diversaj landoj kaj kulturoj, kaj akceli la atingon de egalaĵoj  
por la virino en ĉiuj landoj de la mondo - ne nur jure sed ankaŭ  
socie. Ĉefa evento de la kampanjo estos la Konferenco de la Internacia  
Jaro de la Virino, kiu okazos en Meksikurbo de 19 junio ĝis 2 julio.  
Reprezentantoj de UEA en tiu konferenco estos s-ro Mark Starr (Usono)  
kaj prof-ino Maria Luisa S. de Bancalari (Meksiko).

Por UEA la ĉefa kontribuo al la Jaro estos la 60a Universala Kon-  
greso de Esperanto, kiu okazos en Kopenhago, Danlando, de 26 julio  
ĝis 2 aŭgusto 1975, kaj ĝia ĉefa temo estos la socia rolo de la  
virino. Tamen oni antaŭvidas pliajn kontribuojn je nacia kaj lokaj  
niveletoj, per la gazetaro, en grupkunvenoj pri la Jaro ktp. Kiel granda  
internacia organizo, kun unusola lingvo, nome Esperanto, la Asocio  
estas tre konscia pri sia unika kapablo funkcii kiel forumo por la  
virinoj el ĉiuj landoj, kaj perilo por studado de virinaj problemoj.

\*\*\*\*\*

### Venu al Oberkirch

#### Alvoko de la Loka Kongresa Komitato

Kutime niaj kongresoj okazas en urboj sufiĉe grandaj kun nomoj  
tre konataj. Sed de tempo al tempo GEA decidis kongresi ankaŭ  
en pli malgrandaj lokoj, se tiuj situas en interesa kaj alloga  
pejzaĝo. Al tiuj urbetoj sendube apartenas Oberkirch en la Nigra  
Arbaro, kiu dum pentekosto 1975 jam la duan fojon akceptos la ger-  
manajn esperantistojn kaj certe ankaŭ ardon da eksterlandaj gesam-  
ideanoj.

La esperantistoj ofte plendas, ke la vasta publiko ne sufiĉe atent-  
nias aferon. Sed bedaŭrinde ni mem ofte preterlasas okazojn, montri  
nian propran intereson pri nia lingvo kaj la organizaĵoj, kiuj re-  
prezentas la Esperanto-movadon. Forresto de Germana Esperanto-Kongreso  
malhelpas al la sindonaj organizantoj plenumi la intencitan programon,  
kiu estas necesa por interesi ankaŭ la vastan publikon. Gazetaro,  
radio, televido kaj oficialaj instancoj juĝas pri ni laŭ nia propra  
interesiĝo. Malmultaj partoprenantoj provas al la publiko, ke nia  
afero ne progresas.

Do, karaj gesamideanoj, venu dum pentekosto al la ĉarma Oberkirch  
kaj pruvu per via partopreno, ke vi deziras kunhelpi al sukceso de  
nia 53a Germana Esperanto-Kongreso. Nia ĉefa temo estas "Esperanto-  
Turismo". Oberkirch mem kaj ĝia rava pejzaĝo plene taŭgas por feriado,  
ĉu longa aŭ nur kelktaga. Ni estas certaj, ke via restado ĉe ni dum  
longa tempo restos agrable en via memoro.

F. W. Poppeck

#### Esperanto-panelo dum festivalo "Artoj kaj Kulturo"

Le Perreux, Francio (pp). Dum la 3a festivalo "Artoj kaj Kulturo"  
de la 26 aprilo - 4 majo okazinta sub cirkstendego sur la placo de la  
urbodomo de Le Perreux, la Centre Culturel d'Espéranto du Perreux sub  
gvido de Roger Despiney prezentis Esperanto-panelon kun la sloganon  
"Esperanto, ponto de amikeco inter Forchheim kaj Le Perreux."

## Antaŭ 30 jaroj finiĝis la dua mondmilito

Romo (pp) En sia elsendo de la 27a de aprilo la Esperanto-redakcio de Radio Roma sub la programero "Novaĵoj el Italujo" elsendis jenan tekston:

"La 25an de aprilo 1975a oni solene celebris en tuta Italujo la 30-jaran datrevenon de la fino de la dua mondmilito, kaj de la liberigo de Italujo el la faŝisma reĝimo kaj el la nazia okupado.

La spirito de la memorigoj estis indikita de la Prezidanto de la Respubliko, Giovanni Leone, dum la parolado, per kiu en la Parla-mentejo li malfernis la celebradojn. LEONE invitis la italan popolon forlasi malanon, rezigni je venĝoj, celi la vojon de l' progreso en klimato de sekureco, socia paco kaj vera demokrateco. La Prezidanto aldonis, ke en ĉi tiu memorigo de la Rezisto kontraŭ faŝismo la itala estraro devas ankaŭ agnoski respondecojn kaj korekti erarerojn, ĉefe por plifortigi la demokratian engaĝitecon, ŝirmi la kolektivajn sekurecojn forigi la alarmon, kiu serpentumas ĉe la popolamasoj pro la atencoj al la respublikaj principoj fare de frenezuloj, kiu volus restarigi diktatorecan sistemon. La Prezidanto ankaŭ sin adresis al la junularo, por ke ĝi, pere de ekzemplo kaj konvinka agado, liberigu la samaĝulojn el la allogo venanta el la ribelo kaj el la teroro.

Ĉi tiuj konceptoj estis konfirmitaj de Giovanni Leone en Triesto, dum ceremonio en la "Rizejo de San Sabba", la sola loko en Italujo, kie funkciis nazia koncentrejo. Leone, memoriginte la tri mil viktimojn de la murdejo, kaj ripetinte sian akran kondamnon de naziismo, lanĉis varman alvokon por ke oni flankenmetu ĉian restintan malamon, kaj de- nove ekestu solidareco inter la civitanoj kaj inter la popoloj.

Aliaj aranĝoj disvolviĝis, interalie, en Cassino, unu el la lokoj plej detruitaj dum la milito, kaj en Napolo, la urbo, kiu en septembro 1943a estis protagonisto de la unua armita ribelo kontraŭ naziismo.

En Romo, la ministro Gui omaĝis al la 342 viktimoj de la nazia repre- zacio ĉe "Fosse Ardeatine".

En Alta Adigo/ Sudtirolo, la Rezisto kontraŭ naziismo estis celebrita per paroladoj en la itala kaj en la germana, depende de la loka du- lingvismo. En Ventemiglia, apud la landlimo inter Italujo kaj Francujo, oni memorigis la komunan reziston sur la Alpa Montaro.

La datreveno de la itala liberigo estis ankaŭ memorigita de la Papo, komence de aŭdienco, kiun li donis la 25an de aprilo, en la Sankta- Petro-Placo, al preskaŭ 80 mil fideluloj, italaj kaj eksterlandaj: "Ni ne ignoras - diris Paŭlo sesa - la historian memorigon, kiu hodiaŭ kaptas kaj ĝojigas la italan popolon. Mi ĝin konsideras dum nia preĝo, propetante pacon, justecon, pardonon kaj renovigon por ĉiuj."

La supran tekston verkis Nicolò Carandina, tradukis ĝin Antonio De Salvo.

## Esperanto en televido

Romo. (pp) Laŭ Radio Roma, Esperanto-elsendoj unu el la plej popu- laraj programoj de la itala televido estas, nuntempe, la elsendo "Spaccaquindici", dum kiu la partoprenantoj devas solvi kvizojn kaj diversmaniere montri sian lertecon. Dum la elsendo de la 17a de aprilo, unu el la protagonistoj, la juna kaj ĉarma sinjorino Norma Saccardo menciis, ke ŝi edziniĝis al bulgaro pere de Esperanto, kaj, laŭ peto, ankaŭ eldiris kelkajn vortojn en la internacia lingvo.

## Hermann Behrmann en Varsovio

Varsovio (pp) Hermann Behrmann sukcesis denove surprizi la esperanti- stojn - per intervjuo en la lastdimaŭna Esperanto-Ekspreso de Pola Radio. Li venis al Varsovio por partopreni interlingvistikan semi- naron. Li estas en Pollando la unuan fojon.